



LASTA NUMERO!

N-ro 6 - 2006.08.05

Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Popola kanzono de Florenco diras: “Alportu kison al Florenco” (peto de migranto kiu estis for de sia amata urbo). Ni, kiuj lernis ami ĉi tiun urbon, rajtas forporti la saman kisegon al nia loĝlokoj, kontentaj pro la kongreso, sed ĉefe pro la fakto ke Esperanto ankoraŭfoje sukcesis unuigi homojn el plej diversaj landoj. *Arrivederci!*

“FORPORTU KISEGON EL FLORENCO”



Kongresa Rezolucio

La 91a Universala Kongreso de Esperanto,

kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2206 partoprenantoj el 62 landoj,

konstatinte,

- ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005 – 2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla,
- ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio,
- ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado.
- ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon respondece kaj solidare.

Alvokas

la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas

al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas

la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

Florenco, 2006. 08. 04

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2008 okazos en Roterdamo, okaze de la 100-jariĝo de UEA.

VETERANA ESPERANTISTA KLUBO - Dudeko da kongresanoj ĉeestis la kunsidon de VEK vendrede, 4-an de aŭgusto, por aprobi novan statuton kaj elekti la estraron. Laŭ la statuto, tiuj kiuj esperantistiĝis antaŭ minimume 40 jarojn rajtas aniĝi. La nova estraro estas Diccon Masterman (prezidanto), Lucy Harmon (vic-prezidanto) kaj Michela Lipari (sekretario). La kotizo estas libervola, sed la rekomendita kotizo estas tiu de Membro kun Gvidlibro de UEA. Informoj pri la agadoj de VEK estos publikigitaj de Biblioteko Hector Hodler kaj kotizoj estas pageblaj al la kasisto de UEA. Aliĝemuloj kontaktu UEA'n aŭ la sekretariojn (KN 99). La plej malnova esperantisto kiu aliĝas, havos la honoran titolon "Dojeno". *Raportis Diccon Masterman*

Dante kaj Ĉeĥov - Post la spektaklo de Giuliano Turone, ĉiuj spektaktoj entuziasme opiniis, ke ĝi en si mem, eĉ se estus la sola kongresa programero, sufiĉus por pravigi la partoprenanton en la Florenca U.K. Envere, la aktora kapablo, la varieco de la artismo kaj la evidenta erudicio de la monologa prezentisto indus honoran lokon en kiu ajn renoma nacia teatro. La publiko ridis ĝis larmoj, kiam Giuliano Turone mimike deklamis en pluraj lingvoj la unuajn versojn de la "Komedio" de Dante, imitante diverslandajn stereotipojn. Tamen, la ridoj ne povis kaŝi la vualitan lecionon pri kompara tradukanto, en kiu elstaris la esperanta versio de la "Infero" en la plumo de Kalocsay. Tute alie aspektis la klasika unuaktaĵo de Anton Ĉeĥov "Pri la malutilo de la tabako": humuro kaj drama sinkonfeso tiel interplektiĝas en la verko, ke nur unuaranga aktoro kiel Giuliano Turone povis transiri de unu gamo al alia, libere, flue, teatrece. *Raportis: GCF*

Komitato de UEA kunsidis - La Komitato de UEA kunsidis dum tri intensaj horoj vendrede matene. Dum tiuj horoj ĝi traktis proponojn kaj rekomendojn el ĉiuj ok subkomitataj kunsidoj, faris ŝanĝojn kaj decidojn. Laŭ rekomendo de la komisiono pri statuto de landaj kaj fakaj asocioj, la Komitato akceptis du novajn landajn asociojn kaj kunlaborantajn kontraktojn kun du fakaj asocioj: Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj, Nepala Esperanto-Asocio, Eŭropo Demokratio Esperanto, Rondo Kato. La Elekta Komisiono informis pri sia laboro, ĉar la venonta jaro estos elektojaro. Rezolucio oni prezentos en la fermo sabate. Fine, la estraro invitis al Komitata kunveno en Jokohamo en aŭgusto 2007. La Komitato estas la supera organo de UEA, kun reprezentantoj de landaj kaj fakaj asocioj. *Raportis: Ulla Luin, KN 81*

MAURO NERVILEGAS DANTE

Laŭdante Dante, Nervi bravas,
klarige kiel Dio savas
kaj por Paradiz' sufiĉe
estas ami Beatrice
- Laŭ Dante.

Beatrice riĉe lumas;
enh kontemplo ŝi brilumas.
Viaj vortoj, kara Mauro,
meritas je beata laŭro
- beat-riĉe.

Humphrey Tonkin

Kunveno de I.K.E.K. okazis en salono Stoppoloni vendrede je la 11a horo. Ariĝis ĉ. 40 scivolemuloj, prezidis la kunsidon Stan Keable prezidanto de I.K.E.K. Estis farita rezolucio pri la milito de Israelo kaj politika situacio en meza oriento. Aldone leviĝis voĉoj el aliaj kontinentoj Ameriko, Afriko kaj Azio. *Raportis D. Rooke, KN 257*

MIRINDA KONCERTO ravis ĉiujn homojn kiuj partoprenis la junularan programon per la orelfrapa muziko de Dolchamar, finna rokgrupo. La tutan areon okupis verdokulaj esperantistoj kiuj post la vingustumado furore ĝuis la amasan dancadon kaj kantadon. "Mi ŝategis ĉi-jaran junularan programon kaj certe intencas veni al venonta IJF ĉar italoj havas vere bongustegan vinon kiu neprigos mian ĉeeston dum la sekvontaj dek jaroj en Italio!!!" asertis ĉarma litovino ĉe niaj mikrofonoj. "Ankaŭ la ekskursoj, ĉefe tiu al la maro, estis tiel bone organizitaj kaj sekve tiel sukcesaj, ke mi sentas devige gratuli al LKK pri junularaj aranĝoj, kaj ĉefunue al Daniela kaj Francesco" kriis Nicola, IEJ-prezidanto, dum koncerta saltado en Villa Camerata, ĉefurbo de Junesperantio.

Invitoj

Grava atentigo por la dumkongresaj fotistoj kaj filmistoj - ĉiuj el vi estas petataj sendi DVD de viaj artaj selektitaj laboroj al ARCOIRIS TV, Via Curtatona 5/2, IT-41100 Modena, Italio (al atentigo de d-ro Rodrigo) kiu pretas senpage enmeti kaj publikigi ilin en propra Esperanto-Sekcio. Oni eblas rekte enigi la dosierojn per: ftp://ftp.arcoiris.tv. Nomo: avi - Pasvorto: avi. La arkivo de Arcoiris TV estas akirebla de hejma komputilo kaj taŭga informilo por nia Internacia Lingvo favore de la vasta publiko. <http://www.arcoiris.tv>

Rompiĝemaj ostoj / Osteogenesis Imperfecta. Mia edzino (KN 2202) vivas kun rompiĝemaj ostoj, la tipo estas III, ŝi estas malalta kaj devigata uzi rulseĝon. Ŝi laboras kiel sekretariino ĉe Svisa registara pri-forsta (arbaroj) oficejo, kvankam ŝia nacieco estas itala. Dum mi (mem kuracisto) oficis kadre de OIFE, la eŭropa tegment- organizaĵo pri "Osteogenesis imperfecta" (=OI) kiel la Svisa delegito ĝis 2003-a jaro, mi konstatis, ke la multaj lingvoj de Eŭropo ankaŭ malhelpadas en OIFE la kunlaboron. Dum tia UK en varma etoso, oni ne kredus, ke estas maloftaj la Esperantistoj en la mondo. Homoj kun la handikapo OI estas ankaŭ tre maloftaj kaj malpli facile troveblaj. Tre ege mi ŝatus konatiĝi rekte kun OI-uloj, kiuj scipovas lingvon internacian por interŝanĝo pli senpera de informoj ol per lingvo Angla (nura laborlingvo ĉe OIFE) kaj por eventuala nova enkonduko de ESPERANTO-FAKO ĉe OIFE. Se vi konas personon kun OI, bonvolu transdoni tiun-ĉi gazet-eltranĉon el Florenca Lilio al ŝi/li - Dankon. Aŭ vi mem helpu min komuniki kun vialingvulo kun OI per nia lingvo (- vi traduketu por iu OI-ulo, kiun jam mi konas, sed ne povas bone interkompreniĝi sen Esperanto: jam mi bezonas pri lingvoj japana, kroata, portugala). Esperantistoj trovos pri Simonetta kaj mi detalojn ankaŭ en Pasporta Servo 2006, Svislando, urbo Berno, sed tie intence mankas mia retadreso, ĉar mi nur malofte kontrolas. Bonvolu doni al mi detalojn pri vi, mi telefonvokos aŭ (ret-)leteros al vi. Atentu: mi estas for, pro italaj UK kaj ferioj, ĝis 2006-08-08. Telefono +41 31 911 64 72 (bonvolu paroli al respondilo). Neniam sendu retpoŝte pli ol 50 kB

<ueli.haenni@swissonline.ch>

Vendrede en “Fortezza da Basso” la internacia arta vespero bone sukcesis.

Ĉiuj kontinentoj estis reprezentitaj. Sub la reĝisorado de Alan Bishop kaj Mireille Grosjean kaj per la prezentado de Katalin Kováts, Jill Gubbins kaj Fabrizio Pagliaroli aŭdiĝis literaturo, muziko, kantoj; oni spektis teatran monologon (kiel ĉiam aminda kaj aŭskultenda estis artistino Vida Jerman) kaj dancojn. Senpeka kaj rava estis la prezento de Andrej Korobejnikov, kiu estis ĉirkaŭita de kortuŝa noto: la dediĉo al la infanoj de Beslan (*placeto fronte al Fortezza da Basso estas titolita al ili*). Intensajn notojn eliris el sia fluto Lidija Gomolickaite-Grudzinskaite. Plenigis la okulojn per mil koloroj la kostumoj de niaj aziaj samideanoj. El Koreio venis la dancado de Hortensio kaj kvaropo el Japanio dancis por ni, por ke ni antaŭgustumu la etoson de la venonta UK. Originalan version de la Himno prezentis “flamenco”-stile artisto Solo, dum la Himno al la ĝojo (eŭropa himno) estis komence de la vespero ludata de la “Internacia Koruso”. Pri ĉi-lasto: por la unua fojo ĝi prezentis la E-lingvan komponaĵon “*In terra pax*” (“Estu paco surtere”), kies teksto ligas la vortojn de la Betlehema anĝelo al la interna ideo de Esperanto kaj plue al la memkompreno de la kongresurbo, kies skabeno pri sporto kaj internaciaj kulturaj eventoj honorigis la kongresanojn esti “kunhelpantoj en la pacaj celoj de Florenco”. Akompanis pianе Irina Mirinova, gvidis la komponisto mem, Rössler, kiu spontane estis transpreninta la taskojn de ĥorestro dum tiu ĉi kongreso. Aliaj notindaj kaj lertaj artistoj kiuj kontribuis al la sukceso de la vespero (ekz.: Natalja Kasymova el Taĝikistano/Germanio kaj tenoro Jean Thierry Van Büren).

). Du finaj surprizoj estis la kantado de “Funiculi, funicolà” (ĝi estas kanzono de urbo Napolo, neniel rilatanta kun Florenco, sed ne gravas) kaj kantoj de niaj samideanoj el Nepalo.

Dum la vespero interplektiĝis la de temp’ al tempa prezento de sonetoj de Giuseppe Gioachino Belli (dialekta poeto de urbo Romo, Italio, vivinta en la 19a jc.), tradukitaj en esperanton interalie fare de la nova honora membro de UEA, Umberto Broccatelli. Unu el la prezentitaj sonetoj estis ekzemplo de elstara traduko, ĉar la originala poezio havas ĉiujn rimojn per –ski. Tio donis la okazon al Carlo Sarandrea (kiu prezentis la sonetojn) por inviti la ĉeestantojn al “ski-ado”: (bona ideo dum varmego vetero): la publiko eldiris laŭte ĉe ĉiu verso-fino “ski”. Post tio, okazis hazarda sed brila koincido: la posta artisto havis nomon kiu finiĝas per “-ski”.

Giuseppe Gioachino Belli, romdialekta poeto de la 19a jc. SEN TITOLO

Zenajde, graf-edzino de Volkonski,
vi volas igi min danĝere riski,
oni provos al mi telerojn disk
ĉar neniu kapablos min agnoski.

Mi lernis versi sed ne arabeski
kaj devas ofte min protekte maski,
ĉar mi vidas bastonojn min embuski
kaj devas fuĝi for por ne groteski.

Mi nur en Romo povis daŭre kreski,
kaj do ne povas vorte ŝajn-etruski
kiel vi aŭ sinjoro Viaseski.

Sufiĉas! Venis tempo nun ektaski
por fine viri kaj ne nur moluski
kaj sekve ĉu karesmi, ĉu eĉ paski.
trad. Renato Corsetti

LA U.K. FINIĜIS, VIVU LA U.K.

La 92-an UK
en 2007
en Jokohamo,
Japanio!



Jen estas la bonveniga saluto de la urbestro de Jokohamo, gastigonta la 92an UK (laŭ la traduko de la LKK por la 92a UK)

Al la partoprenantoj de la 91a Universala Kongreso de Esperanto

Gratulon pro la 91a Universala Kongreso de Esperanto, mi sendas al vi reprezentante la urbanojn de Jokohamo, Japanio.

Jokohamo, ekde la malfermo antaŭ 147 jaroj, ĝuadis reputacion je internacia urbo, kun bela haveno kaj verdoplena naturaĵo.

Post la ekesto de “Pacifiko Jokohamo”, la konferencejo je la pinta nivelo en Japanio, ni gastigis diversajn kongresojn kaj eventojn, inkluzive de la finalejo de la Monda Futbala Ĉampioneco en 2002, kaj tiel ni gastigis multajn el la tuta mondo.

En Jokohamo estas krome kvartalo nomata Minato-Mirai (Futur-haveno), 21 kulturaj heredaĵoj, japaneska ĝardeno nomata Sankei-en kun la harmonio de la historiaj konstruaĵoj kaj ĉiusezonaj naturaĵoj. Ni ankaŭ havas Ĉinan Kvartalon, plej grandan en la mondo, kaj aliajn butikumejojn, kiuj promesas al vi vivon ĝuendan post la kongresaj horoj.

Kiel vi bone scias, en 2007, la Universala Kongreso, duafoja en Japanio, okazos en tiu ĉi urbo Jokohamo.

Ni kiel gastiganta urbo, kore bonvenigas la Kongreson, kaj ni esperas, ke la Kongreson vi partoprenos, kaj ke Vi ĝuu interkompreniĝon kun jokohamanoj.

Ĝis la renkontiĝo en Jokohamo, **NAKATA Hirosi, la Urbestro de Jokohamo- La 25an de Julio, 2006.**

Leteroj

Estimataj prizorgantoj de Florenca Lilio, el Reykjavik, Islando mi sendas al vi miajn varmajn salutojn kaj gratulojn pro via bonega laboro por la Kongresa Kuriero. Ĝi estas kaj tre informa kaj lingve elstara. Mi legas ĝin ĉiutage kaj tiel povas trasenti la kongresan etoson. Tre kore, **Baldur Ragnarsson.**

Saluton! Bedaŭrinde mi ne havis okazon partopreni en la UK en Florenco, sed estis granda plezuro por mi ektrivi ke mi havas eblecon rete legi pri la kongresaj okazaĵoj de mia loĝloko en Svedio en la Lilio! Dankon pro tiu ebleco kaj via bona laboro! Amike salutas, **Sten Svenonius, Malmö, Svedio**

Lastegaj aliĝoj

- 2207 S-rino HU Nan, Wu hen jon an gu, Xu zhou xin cun 287-2, Ĉinio
2208 S-ro PENG Nian, Meiyuanxiaogu 201-3-2, Wuhan, Hubei, Ĉinio
2209 Bebo AQUILINA Cristiano, Vicolo degli orti 12, I-05035 Narni TR, Italio

Pri la kongreso en gazetaro

En la pasinta LILIO-numero ni raportis pri la intensa agado de esperantisto **Giorgio Bronzetti**, kiu, per la gazetaraj komunikoj de la informagentejo DISVASTIGO, de li gvidata, sukcesis aperi multajn gazetartikolojn pri E-o kaj la UK. Jen manpleno da ili:

4/8/06 Abruzzopress - Raporto de prof-rino Colacicchi de urbo Pescara, dum la UK (instruo de la fremdaj lingvoj en la italaj lernejoj)

4/8/06 Abruzzo Oggi – U.K.: pri Esperanto oni parolas ankaŭ la Pescara-dialekto.

4/8/06 La Cronaca d’Abruzzo Herzberg, Urbo de Esperanto

3/8/06 Il Piccolo d’Abruzzo: Herzberg, Urbo de Esperanto

2/8/06 Abruzzopress: En Florenco studotago dediĉita al Bruno Migliorini

2/8/06 TarantoFuturo: En Florenco studotago dediĉita al Bruno Migliorini

1/8/06 Il Piccolo d’Abruzzo kaj **TarantoFuturo** kaj **Abruzzopress:** el la UK de E-o laŭdo al la lingvoj

31/7/06 Il Piccolo d’Abruzzo: En Florenco studotago dediĉita al Bruno Migliorini

Malpozitiva anglalingva retartikolo estas tiu kiu aperis anglalingve la 2an de aŭgusto je:
http://www.spot-on.com/archives/martinelli/2006/08/esperanto_lost_in_translation.html

**En www.uk2006.info
vi trovos ĉiujn LILIOJN
kiuj burĝonis por la UK**

se la adreso ne validus, provu:
www.ikue.org/uk/uk01.pdf
www.ikue.org/uk/uk02.pdf
www.ikue.org/uk/uk03.pdf
www.ikue.org/uk/uk04.pdf
www.ikue.org/uk/uk05.pdf
www.ikue.org/uk/uk06.pdf

Por la realigo de Florenca Lilio, kunlaboris:


Carlo Sarandrea, Marija Belošević, Diccon Masterman, Giovanna Licciardello, Gianluca Campanella. Ili transdonas la torĉon al la venontjaraj redaktoroj, kun multe da sinceraj bondeziroj kaj salutoj, petdezirante ke ilia laboro estos same ĝojiga kaj interesa, kiel estis la nia!

*La plej juna kongresano estis **CRISTIANO AQUILINA**, 2-monata, KN 2209, en ĉi tiu foto dormanta inter la brakoj de sia patro Gabriele. Kisegon al li!*



ĉu parencoj?

**Ken Price (KN 186)
kaj John Malkovic, usona aktoro**



Indre Pileckyte (KN 1869) kaj Laetitia Casta, franca modelulino

FINO (ĉu???)